De la 51 studantaj partoprenantoj, kiujn varbis RFMGIU, je la komenco de la eksperimento 13 jam finis sian studadon (de la inĝeniera- aŭ ekonomiaj sciencoj) kaj vivas plejgrandparte (9 el 13) ne en la universitaturbo. 9 finos sian studadon je la fino de la nuna universitata jaro (dum kiu okazis la eksperimento), 18 probable in la jaroj 2007 aŭ 2008, 11 pli malfrue. De ĉi tiuj 51 partoprenintoj 41 estas rusaj, 5 belrusaj civitanoj, po 2 estis resp estas gestudentoj el Usbekistano kaj Kaĥstano, 1 el Taĝikistano. Ĉiuj komencis trastudi en la reto kiel libervolan kromkurson la kurson pri informaciteorio (KP1). Nur minoritato estis antaŭe partopreninta en kurso enkonduka en la germanan lingvon, tiel ke nur malmultaj partoprenantoj povis trastudi la instrutekston dulingve (en ILo kaj la Germana). Krom la 11 plej

tina Tanc als Tutorin im Kommunikationskybernetischen Zentrum der DAI-ULBS mit den Studierenden, um mit ihnen die aus dem Netz abgerufenen IÄ-Kapitel zu lesen und zu diskutieren. Einige Studierende konnten sich wegen versäumter Teilnahme an einem vorangegangenen ILo-Kurs nur auf die deutsche Textfassung stützen, die meisten anderen arbeiteten zweisprachig.

Der schriftliche Abschlusstest wurde am 9. März 2006 für alle in Form von 20 Wahlantwortfragen mit je einer richtigen Antwort und drei Distraktoren in ILo durchgeführt. 10 Studierende nahmen daran teil, alle erfolgreich. Aus den insgesamt 82% richtigen Antworten lässt sich durch Berücksichtigung der zu erwartenden Zufallstreffer auf eine im Mittel 76%ige Kompetenz der Prüfungsteilnehmer schließen, was noch als gutes Ergebnis zu werten ist.

Von den 51 studierenden Teilnehmern, welche von der RFMGIU geworben wurden, hatten dort bei Versuchsbeginn 13 ihr Studium (der Ingenieur- oder Wirtschaftswissenschaften) bereits abgeschlossen und leben überwiegend (9 von 13) nicht am Universitätsort. 9 schließen ihr Studium am Schluss des noch laufenden Universitätsjahrs (in welchem der Versuch lief) ab, 18 voraussichtlich in den Jahren 2007 oder 2008, 11 später. Von diesen 51 Teilnehmern sind 41 russische, 5 weißrussische Staatsbürger; je 2 waren bzw. sind Studierende aus Usbekistan und Kasachstan, 1 aus Tadschikistan. Alle begannen als freiwilligen Zusatzkurs den Informationstheorie-Kurs (KP1) im Netz durchzuarbeiten. Nur eine Minderheit hatte zuvor an einem Einführungskurs in die deutsche Sprache teilgenommen hatte, so dass nur wenige Teilnehmer den Lehrtext zweisprachig (in ILo und Deutsch) durcharbeiten konnte. Außer den 11 jüngsten Studierenden hatte alle schon im Dezember

junaj gestudentoj ĉiuj estis jam en la decembro 2003 partoprenintaj en RFMGIU la 8-horan, persone laŭ la rekta metodo okazigita lingva rapidkurso ILoSc (*ILo por sciencistoj*) de gastprofesoro Dr. Helmar Frank. La 11 plej junaj gestudentoj partoprenis je la komenco de la projekto en la oktobro 2005 en ILo-rapidkurso, kiun realigis la aŭtorino en la rusa lingvo dum 10 duoblaj horoj. Ankaŭ ĉiuj 40 pli maljunaj gestudentoj estis ILon pliprofundige plulernintaj ĉe la aŭtorino antaŭ la komenco de la projekto.

La kurso KP1 estis dispartigata en 11 lekciojn. Tiucele la 19 taskstarigaĵoj post la unuopaj ĉapitroj de la libro estis arigataj al 11 grupoj. La gestudentoj devis memstare kaj unuope trastudi la instrutekstojn en la reto kaj solvi la alordigitajn taskojn. La solvojn ili devis en ILo rete sendi al la aŭtorino rolanta kiel tutorino (kiu ne komprenas la germanan lingvon). Vortaroj estis je dispono.

Ĉiun semajnfinon la aŭtorino kontrolis hejme la al ŝi retitajn solvojn. Se ili enhavis erarojn, ŝi rifuzis ilin, alikaze estis trastudenda la sekva lekcio. La rifuzo okazis je la unua fojo per la sciigo, ke la solvo enhavas eraroj kaj devas esti ekzamenata. Se ankaŭ en la sekva semajno ne venis la senpeka solvo, la eraraj tekstlokoj estis markitaj kiel tiaj. Nur se la studento sekve petis tialigi la erarecon, li ricevis enhavan instrukcion – alikaze li povis principe provi laŭplaĉe multajn proprajn korektaĵojn, kio kostis po unu plua kalendara semajno, ĉar nur sabate funkciis retrokuplado. La imitmodelaj solvoj, kiuj troviĝas en la libra formo de KP1 (ne ankaŭ en la reta varianto), ne estis utiligataj. (Neniu partopreninto

2003 an der RFMGIU an dem 8-stündigen, personal nach der direkten Methode durchgeführten Sprachschnellkurs ILoSc (*ILo por sciencistoj*) von Gastprofessor Dr.Helmar Frank teilgenommen. Die 11 jüngsten Studierenden nahmen zu Projektbeginn im Oktober 2005 an einem von der Autorin in russischer Sprache durchgeführten ILo-Schnellkurs im Umfang von 10 Doppelstunden teil. Auch alle 40 älteren Studierenden hatten vor Projektbeginn bei der Autorin ILo vertiefend weitergelernt.

Der Kurs KP1 wurde in 11 Lektionen gegliedert, wozu die 19 Aufgabenstellungen nach den Einzelkapiteln der Buchfassung zu 11 Gruppen gebündelt wurden. Die Studierenden sollten die Lehrtexte selbständig und individuell im Netz durcharbeiten und die zugehörigen Aufgaben lösen. Die Lösungen sollten in ILo der dabei als Tutorin wirkenden Autorin (welche die deutsche Sprache nicht beherrscht) netzbrieflich übermittelt werden. Wörterbücher standen zur Verfügung.

An jedem Wochenende prüfte die Autorin zuhause die ihr zugenetzten Lösungen. Enthielten sie Fehler, wurden sie zurückgewiesen, andernfalls sollte die nächste Lektion bearbeitet werden. Die Zurückweisung erfolgte zunächst durch den Hinweis, die Lösung sei fehlerhaft und solle überprüft werden. Kam auch in der Folgewoche nicht die einwandfreie Lösung, wurden die fehlerhaften Stellen als solche gekennzeichnet. Nur wenn der Studierende daraufhin um Begründung der Fehlerhaftigkeit bat, erhielt er eine inhaltliche Belehrung, andernfalls konnte er im Prinzip beliebig viel eigene Verbesserungsversuche machen, was wegen der nur an den Samstagen erfolgenden Rückkoppelung je eine weitere Kalenderwoche beanspruchte. Von den Musterlösungen, die in der Buchfassung von KP1 (nicht auch in der Netzfassung) enthalten sind,

disponis pri la materia studlibro.) Laŭ ĉi tiu algoritmo do estis bezonataj minimume 11 semajnoj por la trastudado de la kurso, nome po 1 semajno por ĉiu lekcio.

Aritme la 22 (de la komence 51) partoprenantoj, kiuj daŭrigis ĝis la fino, 2 semajnojn je lekcio, sume do 22 semajnojn. Tial la fina ekzameno povis (denove en la reto kaj en ILo) okazi samtempe por ĉiuj 22 restintaj partoprenantoj en la aprilo 2006. Ĉiuj sukcesis. De la 51-22 = 29 partoprenintoj, kiuj *ne* atingis la studcelon, nur 23 antaŭe ĉesis sian partoprenon – 6 partoprenintoj ne povis kandidiĝi, ĉar je la tempopunkto de la ekzameno ili ankoraŭ ne estis plenuminta la lastan (11an) lekcion de la kurso.

Por la prijuĝo de la lernsukceso la jenaj detaloj estas krome rimarkindaj. La rusa notskalo iras de 1 (plej malbona noto) ĝis 5. De la 22 kandidatoj atingis 7 la noton 3 (kriterio: almenaŭ 6/10 da ĝustaj tasksolvoj de la AIS-notskalo), 9 la noton 4 (almenaŭ 8/10 ĝustaj solvoj), 6 la noton 5 (senescepte ĝustaj solvoj de la 11 starigitaj ekzamentaskoj). De la 13 iamaj, intertempe jam profesion plenumantaj gestudentoj de RFMGIU 8 (62%) atingis la kurscelon, de la 9 partoprenintoj, kiuj kompletigos en la somero 2006 sian studadon, temis pri 4 (44%), de la 18 partoprenintoj, kiuj studas en unu el la du pli malaltaj studjaroj sed ankaŭ jam partoprenis en la ILo-kurso de Prof. Frank kaj en la persone de li en ILo okazigitaj komunikadkibernetikaj kursoj, 7 (39%) sukcese finis perrete la kurson KP1, de la 11 plej junaj gestudentoj nur 3 (27%). Entute 44% (18 el 41) de la partoprenintoj kun rusa ŝtataneco sukcesis, 40% (2 el 5) de la besrusoj, kaj po unu

wurde kein Gebrauch gemacht. (Kein Teilnehmer verfügte über die Buchfassung.) Mindestens waren nach diesem Algorithmus also 11 Wochen zur Kursdurcharbeitung erforderlich, nämlich je 1 Woche für jede Lektion.

Im Mittel benötigten die 22 (der anfänglich 51) Teilnehmer, die bis zum Schluss durchhielten, 2 Wochen pro Lektion, insgesamt also 22 Wochen. Daher konnte (wieder im Netz und in ILo) die Schlussprüfung im April 2006 gleichzeitig für alle 22 verbliebenen Teilnehmer durchgeführt werden. Alle bestanden. Von den 51-22 = 29 Teilnehmern, die das Studienziel *nicht* erreichten, hatten nur 23 vorher die Teilnahme abgebrochen – 6 Teilnehmer konnten nicht kandidieren, weil sie zum Prüfungszeitpunkt die letzte (11.) Lektion des Kurses noch nicht bewältigt hatten.

Zur Beurteilung des Lernerfolgs sind noch folgende Einzelheiten bemerkenswert. Die russische Notenskala reicht von 1 (schlechteste Note) bis 5. Von den 22 Kandidaten erreichten 7 die Note 3 (Voraussetzung: mindestens 6/10 richtige Aufgabenlösungen der AIS-Notenskala), 9 die Note 4 (mindestens 8/10 richtige Lösungen), 6 die Note 5 (ausnahmslos richtige Lösungen der 11 gestellten Prüfungsaufgaben). Von den 13 ehemaligen, inzwischen schon berufstätigen Studierenden der RFMGIU erreichten 8 (62%) das Kursziel, von den 9 Teilnehmern, die im Sommer 2006 ihr Studium abschließen, waren es 4 (44%), von den 18 Teilnehmern, die sich in einem der beiden darunter liegenden Studienjahre befinden aber ebenfalls schon am ILo-Kurs von Prof. Frank und den von ihm personal in ILo abgehaltenen kommunikationskyberne-tischen Kursen teilgenommen hatten, erreichten im Netz den erfolgreichen KP1-Kursabschluss 7 (39%), von den 11 jüngsten Studierenden nur 3 (27%). Insgesamt waren 44% (18 von 41) der Teilnehmer mit russischer Staatsangehö-

el la po du usbekoj kaj kasaĥŝtanoj. La Taĝikiŝtano, kiu apartenas al la plej junaj partoprenintoj, ne sukcesis la kurskompeltigon.

Aritme la 22 finekzamenintoj akiris la kompetentecon 84% (mezurita per la procentaĵo de ĝustaj solvoj de la ekzamentaskoj), do la noton 4. -

Spite ĉian atentemon, kiu estas postulenda por la prijuĝo de nura pilotstudo, oni povas konstati:

La grandparte enobjektigita realigo de kursoj rete atingeblaj en du lingvoj, eblas eĉ se la gestudentoj ne' ricevas kompletigan skriban materialon, kaj eĉ se ne almenaŭ unu de la du instrulingvo estas regata kiel gepatra aŭ media lingvo. *Rektaj personaj* kontaktoj kun tutoro ne estas ne malhaveblaj.

Se unu el la du instrulingvoj estas facile lernebla, kiel scienclingvo elprovita planlingvo, tiam proksimume 20 lernhoroj de ĉi tiu instrulingvo sufiĉas por maksimume ĉiu tria partoprenanto por sukcesa studado de la kurso. Se duobliĝas ĉi tiu lerntempo investita en la instrulingvon, tiam ankaŭ duobliĝas la sukceso en la universitataj kursoj realigataj en ĉi tiu lingvo.

Kaze de estontaj aplikoj de finvortigitaj kursoj el KKKK estu uzata la *tuta* universitata jaro. La imitmodelaj solvoj estu farataj *kompletige* atingeblaj almenaŭ por tiuj gestudentoj, kiuj ne tuj ĝuste solvis la taskojn. Por la planlingva preparo al la kurso paralele ofertata en du fremdlingvoj estu enplanata proksimume la duobla tempo almenaŭ por tiuj gestudentoj, kiuj ne regas la aplikitan etnan lingvon (t.e. senescepte la Germana en la ĝis nun vortigitaj kursoj el KKKK).

einer der je zwei Usbeken und Kasachstanen erfolgreich. Der zu den jüngsten Teilnehmer gehörende Tadschikistane schaffte den erfolgreichen Abschluss nicht.

Im Mittel erreichten die 22 Kursabsolventen die Kompetenz 84% (gemessen durch den Prozentsatz richtiger Lĉsungen in den Prüfungsaufgaben), also die Note 4. -

Bei aller Vorsicht, die bei der Beurteilung einer bloßen Pilotstudie geboten ist, kann festgestellt werden:

Die weitgehend objektivierte Durchführung im Netz zweisprachig zugänglicher Kurse ist möglich, auch ohne dass die Studierenden ergänzendes schriftliches Material erhalten, und ohne dass mindestens eine der beiden Unterrichtssprachen als Eltern- oder Umweltsprache beherrscht wird. *Direkte persönliche* Kontakte mit einem Tutor sind nicht unerlässlich

Ist eine der beiden Unterrichtssprachen eine lernleichte, als Wissenschaftssprache bewährte Plansprache, dann reichen etwa 20 Lernstunden dieser Unterrichtssprache bei höchstens jedem dritten Teilnehmer für eine erfolgreiche Kursbewältigung aus. Bei Verdoppelung dieser in die Unterrichtssprache investierten Lernzeit verdoppelt sich auch der Erfolg in universitären Kursen, die in dieser Sprache durchgeführt werden.

Bei künftigen Anwendungen ausformulierter Kurse aus den KKKK sollte das *ganze* Universitätsjahr genutzt werden. Die Musterlösungen sollten mindestens denen *ergänzend* zugänglich gemacht werden, die nicht sofort die Aufgaben richtig lösten. Für die plansprachliche Vorbereitung auf den parallel in zwei Fremdsprachen angebotenen Kurs sollte mindestens bei jenen Studierenden, welche die verwendete ethnische Sprache (bei den bisher ausformulierten Kursen von KKKK ausnahmslos Deutsch) nicht beherrschen, etwa die doppelte Zeit eingeplant werden.

Literaturo Schrifttum

Barandovská, V.: *Enkonduka lernolibro de Interlingvistiko.* Editura Univ. Sibiu 1995.

Barandovská, V., G. Lánský, B.S.Meder, A.-M.Pinter & W.F:'Schmid (ed.): *Kybernetische Pädagogik / Klerigkibernetiko.* Vol. I – IV, 1973, V, 1974, VI - VIII, 1993, IX, 1995, X, 1997, XI, 1999.

Closhen, H.P., & H.Frank: *Programmierung einer kybernetischen Grundvorlesung als Versuch zur Hochschuldidaktik.* En: Praxis und Perspektiven des programmierten Unterrichts, Band 2. Quickborn: Schnelle, 1967, 144 – 148. (Repr.: Barandovská et al., III, 117- 122.

Frank, H.: *Kybernetische Grundlagen der Pädagogik.* Agis, Baden-Baden, 1962,[2]1969. (Repr.: Barandovská et al., VII, 1-218.)

Frank, H.: *Propedeŭtiko de la Klerigscienco prospektiva (Vorkurs zur Prospektiven Bildungswissenschaft.* Narr, Tübingen, 1984. (Repr.: Barandovská et al. , VII, 774-906)

Frank, H.: *Klerigkibernetiko / Bildungsybernetik.* KoPäd, München, 1996, [2]1999. (Repr.: Barandovská et al. IX, 3 -240)

Frank, H.: *Zur Rechtfertigung der Bildungstechnologie als akademisches Lehrgebiet durch ihre kybernetisch-padagogischen Modellgrundlagen.* En: A.Melezinek, A.(Hrsg.): Ingenieur 2000 – Overinformed – Undereducated? Referate des 26. Internationalen Sumposiums „Ingenieurpadagogik 97", Leuchtturm-Verlag, 1997, 342 – 347. (Repr.: Barandovská et al., XI, 794- 799)

Frank, H., & H.Franke: *Ästhetische Information / Estetika informacio.* KoPäd, München, 1997. (Repr.: Barandovská et al., XI, 241-361)

Frank, H, I.Hoepner & H.Winguth: *Audiovisuelle Lehrmaschinenprogramme in der Hochschuldidaktik.* En: B.Rollett & K. Weltner (ed.): Perspektiven des programmierten Unterrichts. Wien: Österreichischer Bundesverlag, 1970. 243–246. (Repr.: Barandovská et al., III, 143 – 148)

Frank, H., & G.Lobin: *Lingvo-Orientiga Instruado / Sprachorientierungsunterricht.* KoPäd, München, 1997. (Repr.: Barandovská et al., IX, 362-647)

Frank, H., & N. Maksimova: Informationstheorie für Kommunikations-wissenschaftler/ Informaciteorio por komunikad-sciencistoj. SAIS Nitra & KoPäd München. 2004.

Frank, H., & W. Seipp: *Exkurs über hochschuldidaktische Erfahrungen.* En: F.Rauner & J.Trotier (ed.): Computergesteuerter Unterricht. Stuttgart, 1971. 153-159. (Repr.: Barandovská et al., IV 803-812)

Seipp, W.: *Lehrschrittfragen und Testfragen bei hochschuldidaktischen Kybernetik- Lehrprogrammen.* GrKG, 1972/13, 135-138. (Repr.: Barandovská et al., IV, 813-816)

Weltner, K.: *Autonomes Lernen.* Klett-Cotta, Stuttgart, 1978. (Repr.: Barandovská et al., X, 182-434)

Nome de ĉiuj projektkunlaborantoj la aŭtorino dankas pro la subvencio de la kazstudo fare de Daimler-Chrysler fonduso, kiu ebligis altvalorajn personajn kontaktinterparoladojn.

Namens aller Projektmitarbeiter bedankt sich die Autorin für die Unterstützung der Fallstudie durch die Daimler-Chrysler-Stiftung, die wertvolle persönliche Kontaktgespräche ermöglichte.

Tradukis germanlingven: H.Frank

Oficialaj Sciigoj de AIS
Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino

Fondita en la Respubliko de San Marino
Prezidanta sekretariejo: Kleinenberger Weg 16 B, D-33100 Paderborn,
tel.: (0049-/0-)5251-64200, fakso: (0049-/0-)5251-163533, www.ais-sanmarino.org
Konto: 2051-305 Postbank Hannover (BLZ 250 100 30)

Redakcia respondeco: OProf. Dr.habil. R. Fössmeier Finredaktita: 2006-09-13

Protokolo de la 35-a Ĝenerala Asembleo
de la Scienca Sektoro de AIS San-Marino, okazinta en la LEUKAIS-akademidomaro en Komárno, 2006-09-02, 16:00–17:00.
Ĉeestas jenaj efektivaj membroj: profesoroj Angstl, Fössmeier, Maitzen, Poláková, Quednau, Wickström; pluraj aliaj AIS-anoj havas ĉeestrajton.
1. *Formalaĵoj.* Ĉar nek la prezidanto nek la vicprezidanto povas ĉeesti, la asembleon gvidas senatano OProf. Quednau. La ĜA estis laŭorde kunvokita kaj do estas kvoruma. Protokolo: Fössmeier (protokolofico).
2. *Ĝenerala raporto.* OProf. Quednau raportas pri la evoluo de la kunlaboro de AIS kun AKB (Pollando), IUK (Bulgario) kaj ULBS (Rumanio) kaj pri kunlaborproponoj ricevitaj el Kubo kaj Ukrainio.
3. *Financa raporto 2004.* Trezoristo OProf. Wickström prezentas la spezokalkulon kaj la bilancon por 2004. Ĉar la komunutileco de AIS laŭ germana juro estas suspendita, malmultaj donacoj estis ricevitaj. Pro la subteno de la AIS-klerigejoj en Karlovo kaj Sibio okazis malgranda malgajno, kiel planite. Revizoro Macko raportas, ke OProf. Lobin kaj li kontrolis la librotenadon kaj trovis ĝin en bona ordo kaj sen eraroj. Li proponas senŝarĝigon, prokrastitan de la lasta asembleo, de la estraro por la jaro 2004. La asembleo akceptas.
4. Decido pri regularŝanĝoj.
4.1 La komisionoj pri regularŝanĝoj ankoraŭ ne finis sian laboron; proponoj pri la ekzamenregularo, la studadregularo kaj la kunsidregularo estis prezentitaj interrete kaj estas diskutataj.
4.2 La senato proponas jenan modifon de la alvokoregularo: La deĵortempo de eksterordaj profesoroj (EProf.) finiĝu ĉiam kun la senatperiodo; la nova senato decidu pri plilongigo. Sur la alvoko-dokumentoj ne aperu fin-dato. – La asembleo unuanime akceptas.
5. *Ceteraĵoj.* Elektoj ne okazas. Aliaj aferoj ne estas traktendaj.
Komárno, 2006-09-02
H.-D. Quednau,, kunsidestro
R. Fössmeier, protokolofico

Protokolo de la 58-a senatkunsido
(la 52-a post la oficialigo de AIS fare de la Konsilio de la XII, la 61-a post la fakta eklaboro) okazinta en la LEUKAIS-akademidomaro en Komárno (SK) dum SUS 29. Kunsidtempoj kaj ĉeestantoj:
- Dimanĉon, 2006-08-27, 10:10–10:50; senatanoj Fössmeier, Quednau; vicsenatanoj Angstl, Poláková.
- Merkredon, 2006-08-30, 18:15–19:00; senatanoj Fössmeier, Quednau; vicsenatanoj Angstl, Poláková.
- Ĵaŭdon, 2006-08-31, 19:20–20:35; senatanoj Fössmeier, Quednau, Wickström; vicsenatano Poláková.
- Sabaton, 2006-09-02, 10:10–11:00; senatanoj Fössmeier, Quednau; vicsenatanoj Maitzen, Poláková.

1. Formalaĵoj. Dum ĉiuj kunsidoj ĉeestas almenaŭ kvar senatanoj kaj vicsenatanoj, do la Senato estas kvoruma. Pro la malsano de prezidanto OProf. Frank kaj la neĉeesto de vicprezidanto OProf. Minnaja la kunsidon gvidas OProf. Quednau kiel plej aĝa ĉeesta senatano. Protokolas OProf. Fössmeier.
2. Kompletigo de la ekzamenofico. Dum SUS 29 la ekzamenofico havu jenajn nekonstantajn membrojn: PDoc. Vojáček (sekcio 1), ADoc. Tanc (2), ADoc. Macko (4), ADoc. Bojaĝieva (5), EProf. Lewanderska-Quednau (6). Sekcio 3 ne estas reprezentata en la anaro de SUS 29.

3. *V4-konferenco pri lingvo-politiko.* OProf. Poláková raportas pri lingvo-politika konferenco de la Visegrád-ŝtatoj, kiu okazos fine de novembro en Bratislavo, kaj proponas la aŭspicion de AIS. Unuanime akceptita.
4. *Kontrakto kun IUK Karlovo.* La direktoro de ESPERINFORM-BL, EProf. Leonov, proponas precizigan aldonon al la kontrakto de 2005-05-12/20 pri la agado de AIS en Bulgario. La aldono estas unuanime akceptita. Ĝi aperas en apendico al la protokolo.
5. *Kontrakto kun ISTK.* La Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz proponis al AIS kontrakton pri reaktivigo de la kunlaboro. La senato unuanime decidas modifi la proponon, precipe por certigi, ke mono de AIS ne trairu la kontojn de ISTK. La modifita propono, kiu aperas apendice al la protokolo, estu prezentita al ISTK por subskribo.
6. *Akademiaj solenaĵoj.* Pro la malsano de prezidanto OProf. Frank la solena fermo de SUS 29 okazu en sobra kaj solena etoso. Unuanime akceptita.
7. *Regularoj.* La senato proponas al la ĜA jenan modifon de la alvokoregularo: La deĵortempo de eksterordaj profesoroj (EProf.) finiĝu ĉiam kun la senatperiodo; la nova senato decidu pri plilongigo. Sur la alvokodokumentoj ne aperu fin-dato. La senato unuanime akceptas la proponon. Per du voĉoj kontraŭ du ĝi malakceptas proponon, ke EProf-dokumentoj indiku sciencan fakon. La senato diskutas la proponitajn modifojn de la ekzamen-regularo, kiuj estis jam legeblaj interrete, sed ne sukcesas fintrakti ilin en la disponebla tempo. Pri la diskutita parto okazas interkonsento. La diskuton de la ceteraj partoj finfaros la komisiono instalita en marto.
8. *Agado en Bosnio-Hercegovino.* ADoc. Dr. Preradović pretas labori pri fondo de AIS-filio en la universitato de Banja Luka (BA). OProf. Quednau proponas tiucelan nomumon de ADoc. Preradović kiel EProf. En okazo de urĝa neceso la senata sekretario subskribu provizoran dokumenton. Unuanime akceptita.
9. *Agado en Kubo.* La senato taskas OProf. Wickström, kontakti s-ron Mario Lázaro Azcuy en Kubo, kiu proponis kunlaboron, kaj esplori la eblojn. Unuanime akceptita.
10. *Sesia programo.* OProf. Quednau proponas, ke la spontanee okazinta kurso de EProf. Lewanderska-Quednau pri „nuntempaj rolo kaj tasko de la socikibernetiko" apartenu al la krom-SUS-a programo de la 6-a sekcio kaj valoru 0,5 stu. Unuanime akceptita.
Komárno, 2006-09-02
H.-D. Quednau, kunsidestro
R. Fössmeier, protokolanto

Protokolo de la Asembleo de la Subtena Sektoro okazinta 2006-08-27, 16:15–17:00, kaj 2006-08-31, 18:00–19:15 en la LEUKAIS-akademidomaro en Komárno, dum SUS 29.
1. (*Formalaĵoj*). Ĉeestas la subtenaj membroj Fössmeier, Leonov (por Bulgara AIS), Macko, Poláková (por Slovaka AIS), kaj Quednau. Dum la unua kunveno ne ĉeestas estrarano; post diskuto sub gvidado de OProf. Quednau ĝi decidas prokraston al 2006-08-31. Tiun duan kunsidon gvidas la aganta direktoro OProf. Wickström. Ĉeestas ankaŭ revizoro OProf. Lobin, kun aldona voĉo de AIS Rumanio. Ne plu ĉeestas EProf. Leonov, kiu transigis sian voĉon al OProf. Quednau. Pri kvorumeco ne estas dubo, la tagordo estas akceptita. La kunveno okazas nur en ILo. La protokolon verkas OProf. Fössmeier.
2. (*Ĝenerala kaj financa raportoj*) OProf. Wickström prezentas la finkalkulon pri 2004, kiu estis kontrolita de la revizoroj Lobin kaj Macko. La asembleo diskutas detalojn de la kalkulo. OProf. Lobin dankas al la direktoro pro lia bona laboro kaj proponas akcepton de la bilanco kaj la spezokalkulo kaj senŝarĝigon de la estraro por 2004. La asembleo akceptas sen kontraŭvoĉoj.
3. (Ceter*aĵoj*) La regula asembleo 2007 okazu en la loko de SUS 30 la 4-an de septembro 2007.
Kunsidestro: OProf. Bengt-Arne Wickström
Protokolanto: OProf. Reinhard Fössmeier

Raporto pri la sekcikunsidoj
de AIS San Marino, okazintaj dum SUS 29 en la LEUKAIS-akademidomaro en Komárno, 2006-08-28, 20:00–21:00.
Okazis sekcikunsidoj de sekcioj 1, 4, 5 kaj 6. De sekcioj 2 kaj 3 ne. ĉeestis efektivaj membroj.

Sekcio 1
Sub la gvido de dekano OProf. Poláková la kunsido bonvenigis la anoncon de ASci. Robert Baber pri partopreno en SUS 30 kaj proponis rangoaltigon post lia aktiviĝo.
Fine de la kunsido okazis kunsido de la ĉeestantaj TAKIS-anoj; pro la nuligo de la ĉi-jara TAKIS-kongreso. Ili decidis, ke jarfinan kunsidon de TAKIS iniciatu la ĝisnuna prezidanto OProf. Eva Poláková, kiu antaŭe gvidu retan diskuton pri la estonteco de TAKIS kaj pri elektado de nova estraro por la jaroj 2007–2009.

Sekcio 4
En la kunsido, gvidata de dekano OProf. Angstl, ne okazis decidoj.

Sekcio 5
En la kunsido, kiun gvidis dekano OProf. Maitzen, okazis jenaj decidoj:
- Dr. Ieva Ŝvarcaitė iĝu ADoc. pri fizika geografio.
- Mag. M. Vrhovac iĝu ASci. pri maŝinkonstruado.
- Propono al la senato, ke alvokodokumentoj de eksterordaj profesoroj ne portu limdaton.
- Rezerva propono por la loko de SUS 30 estu Bulgario.

Sekcio 6
En la kunsido, kiun gvidis dekano OProf. Lobin, okazis jenaj decidoj:
- Marcel Delforge iĝu ASci. pri eŭrologio en fakaro 6.3
- Anstataŭ la forpasinta vicdekano, OProf. Grego, estis elektita EProf. Lewanderska-Quednau.
- EProf. Leonov estis elektita kiel vicfakarestro de fakaro 6.2 (ilarmorfologio); tiun decidon la kunsido faris anstataŭ la ne-okazanta fakar-kunsido.

Apendicoj al la senat-protokolo

Kontrakto
inter
Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS)
kaj
ESPERINFORM BL Karlovo (BG)

1) La Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS) kaj ESPERINFORM BL Karlovo subskribas tiun ĉi kontrakton kiel daŭrigon kaj aldonon al la kontrakto de la jaro 2000 pri la agado de la klerigejo de AIS en Karlovo (Internacia Universitato Karlovo) kiel centro de AIS por distanca edukado en Bulgario.
2) Estas starigota scienca konsilio de la klerigejo en Karlovo, kiu estos ĝia gvidorgano kaj konsistos el
- OProf. Dr. Hans-Dietrich Quednau (DE), prezidanto
- EProf. Boĵidar Leonov (BG), direktoro de la klerigejo
- EProf. Alicja Lewanderska-Quednau (DE / PL), vicdirektoro de la klerigejo
- OProf. Dr. Carlo Minnaja (IT)
- OProf. Dr. Reinhard Fössmeier (DE)
- OProf. Dr. Eva Poláková (SK)
- EProf. Dr. Nikolaj Ralev (BG)
- Prof. Tamara Petrovna (RU)

3) Studfakoj de la klerigejo estas: turismiko, esperantologio, eŭrologio, ergonomiko, aplika medicino, informadiko, komputilaj sistemoj, internacia patenta juro, bibliografio, scienc-kaj patent-teknika informado, merkatekonomiko, kaj administradscienco, pedagogio, filozofio, interlingvistiko, muziko kaj arto, ekologio, biometrio, ĵurnalistiko, teologio, teknikaj sciencoj.
4) AIS rajtigas ESPERINFORM BL Karlovo zorgi pri la administrado, librotenado kaj eduka agado de la klerigejo.
5) La studentoj dezirantaj studi surbaze de AIS-programo pagas la kotizojn por la studentaj legitimiloj de AIS. ESPERINFORM BL transpagas la kolektitajn kotizojn al AIS.
6) AIS rajtigas prof. Boĵidar Leonov subskribi la dokumentojn, kiuj certigas la semestran kaj jarfinan edukadon de la studentoj.

7) La studentoj studas surbaze de la aprobita studadprogramo kaj rajtas ekzameniĝi por akiri la gradojn de bakalaŭro, magistro kaj doktoro surbaze de la regularo de AIS. Surbaze de tiuj ekzamenoj kaj diplomlaboroj la studentoj ricevos diplomojn de AIS.
8) Ĉiujare estos organizitaj en Karlovo studadsesioj de AIS surbaze de la regularo de AIS.
9) La klerigejo kunagos kun bulgaraj kaj eksterlandaj universitatoj surbaze de la leĝaj kondiĉoj en Bulgario.
10) La kontrakto estas subskribita en du samvalidaj ekzempleroj, por AIS kaj por ESPERINFORM BL Karlovo.
Nome de AIS: *OProf. Dr. H.-D. Quednau, direktoro de la Klerigofico*
Nome de ESPERINFORM BL: *EProf. Bcĵidar Leonov, direktoro*

Kontrakto pri kunlaborado
inter
Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino
kaj
Internacia Studumo pri Turismo, kaj Kulturo (ISTK)

Rezulte de 15-jara instruado en ISTK kaj 10-jara kunlaboro kun AIS oni decidas daŭrigi tiun-ĉi kunlaboron laŭ jenaj ĉefaj principoj:
1) ISTK ebligas al AIS varbadon de ĉiuj ISTK-studentoj por studado ĉe AIS laŭ ĝia regularo (studentiĝkotizo 0,5 Aku; en 2006: 32.50 €), ekzamenkotizoj rabatitaj laŭ la regularo de la jaro de la studentiĝo [por 2006 = 75 % en certaj landoj]
2) Tiuj studentoj, kiuj aliĝas al AIS-studado, formas la studentaron de AIS-klerigejo Bydgoszcz (AKB). AKB laboras sub gvido de Scienca Konsilio: OProf H.-D. Quednau, OProf G. Lobin, OProf R. Mielcarek, AProf A. Sudoł, AProf A.Kowalczyk, OProf. E. Poláková, EProf. A. Lewanderska-Quednau.
3) Ĉiuj AIS-studentoj rajtas sen aliĝkostoj partopreni ĉiujn studadsesiojn de AIS (SUS, BUS, AIS-studadsesioj sen finaj ekzamenoj). La saman rajton havas ĉiuj studentoj de ISTK, se la studadsesio okazas en Bydgoszcz.
4) La administran kaj programan agadon de AKB prizorgas programkonsilio de ISTK nome de Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo en Bydgoszcz, kadre de kiu funkcias jure ISTK kaj AKB. Laŭ pola eduka leĝo ISTK estas registrita kiel postmatura lernejo, kies diplomojn agnoskis Pola Ministro pri Edukado la 1-an de aŭgusto 2001.
5) Ĉiujare, se estas almenaŭ 5 ISTK- aŭ AKB-studentoj, kiuj kandidatas por bakalaŭriĝo ĉe AIS, okazas bakalaŭraj fin-ekzamenoj en Pollando aŭ alia lando, kiu estas sen gravaj vizaj problemoj atingebla por ĉiuj sin anoncintaj kandidatoj. Tri monatojn antaŭ la ekzamena sesio devas esti ĉe la ekzamen-ofico de AIS la ekspertizoj de la 5 kandidatoj aŭ deklaro de la patrono, ke li ricevis la verkon kaj bontempe disponigos ekspertizon. Se en iu studjaro AIS escepte ne povas organizi tian ekzamen-sesion kaj nur pro tio iuj kandidatoj ne povas ekzameniĝi kaj retiriĝas, AIS repagas al ili ilian studentiĝ-kotizon.
6) ISTK je sia propra kosto okupiĝas pri informado pri ISTK- kaj AIS-studoj en AKB, kio ebligas, ke AKB estas la unua klerigejo de AIS en la mondo kun ĉiutaga instruado en Esperanto.
7) AIS havas la rajton akceptadi ankaŭ kotizojn por la studado en ISTK/AKB. Tiam AIS rajtas konservi 50 % de la studadkotizo kaj nur la aliajn 50 % transpagi al ISTK-konto.
8) La AIS-agadon en Bydgoszcz (AKB) estras la direktoro de la klerigofico de AIS, OProf H.-D. Quednau, kaj administrajn-organizajn AIS-aferojn en AKB prizorgas ASci R.Grzębowska kunlabore kun la Programa Konsilio de ISTK por plej bone solvi ĉiujn administrajn problemojn de AIS en Bydgoszcz.
9) Ĉiu AKB-studento rajtas peti ĉiun fake kompetentan kaj laŭ AIS-regularo rajtigitan AIS-docenton, patroni lian studfinan laboraĵon.
Nome de ISTK: *ASci. A. Grzębowski Prezidanto de la programkomisiono*
Nome de la klerigofico de AIS: *OProf H.-D. Quednau, direktoro de la klerigofico*
Nome de la senato de AIS: *OProf. R. Fössmeier, Senata Sekretario*

Richtlinien für die Kompuskriptabfassung

Außer deutschsprachigen Texten erscheinen ab 2001 auch Artikel in allen vier anderen Arbeitssprachen der Internationalen Akademie der Wissenschaften (AIS) San Marino, also in Internacia Lingvo (ILo), Englisch, Französisch und Italienisch. Bevorzugt werden zweisprachige Beiträge – in ILo und einer der genannten Nationalsprachen - von maximal 14 Druckseiten (ca. 42.000 Anschlägen) Länge. Einsprachige Artikel erscheinen in Deutsch, ILo oder Englisch bis zu einem Umfang von 10 Druckseiten (ca. 30.000 Anschlägen). In Ausnahmefällen können bei Bezahlung einer Mehrseitengebühr auch längere (einsprachige oder zweisprachige) Texte veröffentlicht werden.

Das verwendete Schrifttum ist, nach Autorennamen alphabetisch geordnet, in einem Schrifttumsverzeichnis am Schluss des Beitrags zusammenzustellen – verschiedene Werke desselben Autors chronologisch geordnet, bei Arbeiten aus demselben Jahr nach Zufügung von „a", „b", usf. Die Vornamen der Autoren sind mindestens abgekürzt zu nennen. Bei selbständigen Veröffentlichungen sind anschließend nacheinander Titel (evt. mit zugefügter Übersetzung, falls er nicht in einer der Sprachen dieser Zeitschrift steht), Erscheinungsort und Erscheinungsjahr, womöglich auch Verlag, anzugeben. Zeitschriftenartikel werden - nach dem Titel - vermerkt durch Name der Zeitschrift, Band, Seiten und Jahr. – Im Text selbst soll grundsätzlich durch Nennung des Autorennamens und des Erscheinungsjahrs (evt. mit dem, Zusatz „a" etc.) zitiert werden. – **Bevorzugt werden Beiträge, die auf früher in dieser Zeitschrift erschienene Beiträge anderer Autoren Bezug nehmen.**

Graphiken (die möglichst als Druckvorlagen beizufügen sind) und auch Tabellen sind als „Bild 1" usf. zu nummerieren und nur so im Text zu erwähnen. Formeln sind zu nummerieren.

Den Schluss des Beitrags bilden die Anschrift des Verfassers und ein Knapptext (500 – 1.500 Anschläge einschließlich Titelübersetzung). Dieser ist in mindestens einer der Sprachen Deutsch, Englisch und ILo, die nicht für den Haupttext verwendet wurde, abzufassen.

Die Beiträge werden in unmittelbar rezensierbarer Form sowie auf Diskette erbeten. Artikel, die erst nach erheblicher formaler, sprachlicher oder inhaltlicher Überarbeitung veröffentlichungsreif wären, werden in der Regel ohne Auflistung aller Mängel zurückgewiesen.

Direktivoj por la pretigo de kompuskriptoj

Krom germanlingvaj tekstoj aperos ekde 2001 ankaŭ arikoloj en ĉiuj kvar aliaj laborlingvoj de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, do en Internacia Lingvo (ILo), la Angla, la Franca kaj la Itala. Estas preferataj dulingvaj kontribuaĵoj – en ILo kaj en unu el la menciitaj naciaj lingvoj – maksimume 14 prespaĝojn (ĉ. 42.000 tajpsignojn) longaj. Unulingvaj artikoloj aperadas en la Germana, en ILo aŭen la Angla en amplekso ĝis 10 prespaĝoj (ĉ. 30.000 tajpsignoj). En esceptaj kazoj eblas publikigi ankaŭ pli longajn tekstojn (unulingvajn aŭ dulingvajn) post pago de ekscespaĝa kotizo.

La uzita literaturo estu surlistigita je la fino de la teksto laŭ aŭtornomoj ordigita alfabete; plurajn publikaĵojn de la sama aŭtoro bv. surlistigi en kronologia ordo; en kazo de samjareco aldonu „a", „b", ktp. La nompartoj ne ĉefaj estu almenaŭ mallongigite aldonitaj. De monografioj estu – poste – indikitaj laŭvice la titolo (evt. kun traduko, se ĝi ne estas en unu el la lingvoj de ĉi tiu revuo) , la loko kaj la jaro de la apero kaj laŭeble la eldonejo. Artikoloj en revuoj ktp. estu registritaj post la titolo per la nomo de la revuo, volumo, paĝoj kaj jaro. - En la teksto mem bv. citi pere de la aŭtornomo kaj la aperjaro (evt. aldoninte „a" ktp.). - **Preferataj estas kontribuaĵoj, kiuj referencas al kontribuaĵoj de aliaj aŭtoroj aperintaj pli frue en ĉi tiu revuo.**

Grafikaĵojn (kiuj estas havigendaj laŭeble kiel presoriginaloj) kaj ankaŭ tabelojn bv. numeri per „bildo 1" ktp. kaj mencii en la teksto nur tiel. Formuloj estas numerendaj.

La finon de la kontribuaĵo konstituas la adreso de la aŭtoro kaj resumo (500 – 1.5000 tajpsignoj inkluzive tradukon de la titolo). Ĉi tiu estas vortigenda en minimume unu el la lingvoj Germana, Angla kaj ILo, kiu ne estas uzata por la ĉefteksto.

La kontribuaĵoj estas petataj en senpere recenzebla formo kaj krome sur diskedo. Se artikolo estus publicinda maljam post ampleksa prilaborado formala, lingva aŭ enhava, ĝi estos normale rifuzata sen surlistigo de ĉiuj mankoj.

Regulations concerning the preparation of compuscripts

In addition to texts in German will appear from 2001 onwards also articles in each four other working languages of the International Academy of Sciences (AIS) San Marino, namely in Internacia Lingvo (ILo), English, French and Italian. Articles in two languages – in ILo and one of the mentioned national languages – with a length of not more than 14 printed pages (about 42.000 type-strokes) will be preferred Monolingual articles appear in German, ILo or English with not more than 10 printed pages (about 30.000 type-strokes). Exceptionally also longer texts (in one or two languages) will be published, if a page charge has been paid.

Literature quoted should be listed at the end of the article in alphabetical order of authors' names. Various works by the same author should appear in chronological order of publication. Several items appearing in the same year should be differentiated by the addition of the letters "a", "b", etc. Given names of authors (abbreviated if necessary) should be indicated. Monographs should be named along with place and year of publication and publisher, if known. If articles appearing in journals are quoted, the name, volume, year and page-number should be indicated. Titles in languages other than those of this journal should be accompanied by a translation into one of these if possible. – Quotations within articles must name the author and the year of publication (with an additional letter of the alphabet if necessary). – **Preferred will be texts, which refer to articles of other authors earlier published in this journal.**

Graphics (fit for printing) and also tables should be numbered "figure 1", "figure 2", etc. and should be referred to as such in the text. Mathematical formulae should be numbered.

The end of the text should form the author's address and a resumee (500 – 1.5000 type-strokes including translation of the title) in at least one of the languages German, ILo and English, which is not used for the main text.

The articles are requested in a form which can immediately be submitted for review, and in digital form, too. If an article would be ready for publication only after much revising work of form, language or content, it will be in normal case refused without listing of all deficiencies.